Donacoj al ESF ebligas daŭrajn plibonigojn al Lernu.net kaj aliaj gravaj projektoj. Ĉu ankaŭ vi volas subteni la pliampleksigon, plibonigon kaj pliefikigon de Lernu kiel ilo por disvastigi Esperanton tra la mondo? Kontribuu al la kampanjo '100 000 EUR por ESF': <http://kampanjo.ikso.net/eo> □

La patro kaj la filino

Je la sepa datreveno de sia naskiĝo, knabineto ricevis tiom da bildlibroj, ke ŝia patro – kiu estus devinta prizorgi sian laborejon kaj lasi al ŝia patrino prizorgi la hejmon – opiniis, ke lia filino devus donaci unu aŭ du el siaj novaj libroj al najbareto laŭ la nomo Roberto, kiu ĝuste tiam vizitis, pli laŭ plano ol laŭ hazardo.

Preni librojn, aŭ ion alian, de knabineto estas kiel forpreni armilon de arabo, aŭ dolĉaĵon de bebo, sed la patro de la knabino ricevis sian volon, kaj Roberto ricevis du el ŝiaj libroj. "Fine, restas al vi naŭ," diris la patro – kiu opiniis, ke li estas filozofa kaj infanpsikologo, kaj ne kapablis teni sian buŝon ferma pri la temo.

Kelkajn semajnojn poste, la patro iris al sia libraro por serĉi la vorton 'patro' en la nove eldonita *Plena vortaro de la Akademio de Esperanto*, por regali siajn okulojn per la laŭdoj al patreco tra la jarcentoj, sed li ne trovis la volumon Ĥ ĝis L, kaj tuj poste li malkovris, ke mankas ankoraŭ tri pliaj. Li komencis traserĉi la tutan domon, kaj fine eltrovis, kio okazis al la kvar mankantaj volumoj.

"Ĉi-matene venis viro al la pordo," diris lia filineto, "kaj li ne sciis, kiel veturi de ĉi tie al Barlastono, nek de Barlastono al Roterdamo, kaj li estis afabla viro, multe pli afabla ol Roberto, do mi donacis al li kvar el viaj libroj. Via *Plena vortaro de la Akademio de Esperanto* konsistas el dek tri volumoj, kaj fine restas al vi naŭ, kaj krome, mi certas, ke vi diris, ke la litero Ĥ devus malaperi."

Moralajo: Ĉi tiu vero estas konata jam de Menandro, kiel ankaŭ de Zamenhof: kio estas saŭco por ansero ne estas saŭco por anserido, aŭ kio estas konvena al sciuro ne konvenas al vulturo.

(Kun pardonpeto al James Thurber pro lia fablo.)

Londona lanĉo de literatura antologio



Jen kelkaj fotoj el la lanĉo de la anglalingva antologio de Esperanta literaturo *Star in a Night Sky*, kiu okazis ĉe la Londona Esperanto-Klubo vespere de la 24a de novembro.

Jam de jardekoj revaĵo de homoj kiel William Auld – kaj bedaŭrinde ne okazinta dum lia vivo – la Esperanta antologio estas jam la kvina en la serio pro tio, ke Paŭlo Gubbins komprenis la gravecon de la afero kaj pretis celkonscie labori.

Ni elkore danku Paŭlon pro lia entuziasmo kaj laboremo, la tradukintojn kaj aliajn kunlaborintojn, sed aparte ni danku al Frank Boutle, kiu pretis havi Esperanton en sia serio pri literaturoj de “malmulte parolataj lingvoj de Eŭropo”. Ni montru nian aprobon per aĉeto. La libro utilegos en nia informado – kaj aĉeteblas de EAB kontraŭ £19,99, inkluzive de poŝtkostoj. □



Supre: Frank Boutle kaj Paul Gubbins fiere montras la rezulton de sia laboro. Meze: Trinkajoj fluas. Sube: Paul parolas, dum David Thornell interpretas anglan; kaj Frank Boutle alparolas la publikon.



Ĉe la 37a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA

Jam la 37a Malferma Tago de la Centra Oficejo (CO) de UEA okazis la 24an de novembro pasintjare. Partoprenis pli ol 80 personoj el multaj landoj en programo, kiu entendiĝis dum la tuta tago. La gastparolanto estis prof. Humphrey Tonkin, kiu flugis el Usono por dufoje prelegi – pri “125 jaroj: Esperanto tiam kaj nun” kaj “Traduko kaj originalo en la Esperanto-literaturo”.

La prelegoj kaj aliaj ĉef-programeroj okazis en la nova konferencejo, kiu troviĝas en la dua etaĝo. Taŭgan ĉambregon oni povas ŝovvande krei el du laborĉambroj.



Gastparolanto Humphrey Tonkin ekprezentas sian unuan prelegon “125 jaroj: Esperanto tiam kaj nun” – historia rigardo al la kunteksto de Esperanto ĉe ĝia kreo kaj ĝia nuntempa situacio en la mondo.

Bunta programo

La interesaj kaj altnivelaj ĉefprelegoj tamen neniel estis la solaj allogaĵoj dum tiu tago.

Humphrey Tonkin kaj Michela Lipari ankaŭ prezentis al la publiko la novan eldonaĵon de UEA *Homoj kaj verkoj* (vidu la anoncon sur la lasta paĝo de la pasinta numero de *EAB-Ĝisdate*). Temas pri kolekto de eseoj, kiuj

gajnis premion en la Belartaj Konkursoj de UEA (ĉi tiujn oni okazigas ĉiujare dum la Universala Kongreso). La libron ili similmaniere prezentis okaze de la UK en Hanojo.

UEA, cetere, planas eldoni similajn librojn el premiitaj

verkoj de la Belartaj Konkursoj.

Oni montris tri filmojn: *Lingvo festis naskiĝtagon*, el la Universala Kongreso de 1987, *Vizito al la Centra Oficejo*, kaj pri la muzikgrupo Amindaj *Amindaj koncertas en IJK 2010*.

Krome okazis demandosiesio “Estraranoj respondas”, kun la tri ĉeestantaj estraraninoj de UEA: Loes Demmendaal (respondeca pri financo, administrado kaj TEJO), Claude Nourmont (kulturo, kongresoj kaj edukado), kaj Barbara Pietrzak (informado).

Neniel malplej grava estas vizito al la Libro servo de UEA, kiu vendas je rabato dum la tuta tago. Ĝuste tie, kaj sole tie, oni ricevas konkretan perspektivon super la tuta fizika amplekso de la Esperanta eldonado. Ĝi estas, kompreneble, la plej granda Esperanta libro servo en la

Humphrey Tonkin kaj Michela Lipari prezentas la novan esearon Homoj kaj verkoj.



Fotis Geoffrey Sutton



mondo (vidu la fotojn ĉi-paĝajn).
Nepre vizitinda, ĉu ne?

Krome funkciis bazareto de
diversaj esperantaĵoj.

Necesis kunporti siajn
proprajn manĝaĵojn, aŭ manĝi
ekstere, sed la oficejo provizis la
partoprenantojn per senpagaj
kafo kaj teo.

Plia utilo de partopreno estas
la ŝanco ekkoni kaj babili kun
oficistoj de UEA kaj demandi ilin
pri kio ajn, ĉu la Konstantan
Kongresan Sekretarion, la Libro-



*Libroservisto Ionel Oneț servas
partoprenantojn de la Tago, dum
kiu oni rajtas aĉeti je rabato.*

ĉu trajne tra la tunelo – kaj
Nederlando havas unu el la plej
ellaboritaj kaj glate funkciaj
transportretaroj en Eŭropo.

(Prelego de Humphrey
Tonkin estas legebla/elŝutebla el
la retejo Edukado.net.)



Plej supre: *Osmo Buller prezentas
la estraraninojn antaŭ la demando-
sesio. Supre: Ĉe filmo. Dekstre:
Plenŝtopitaj bretaroj de la Libroservo.*



UEA intervenis en Esperanto ĉe UN en Ĝenevo

La 27an kaj 28an de novembro okazis la 5a Forumo pri Minoritatoj en la Palaco de Nacioj, la Ĝeneva oficejo de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝia temo estis la plenumado de la Deklaracio pri la Rajtoj de Personoj Apartenantaj al Naciaj aŭ Etnaj, Religiaj kaj Lingvaj Malplimulto, adoptita de la Ĝenerala Asembleo de UN la 18an de decembro 1992. Kiel reprezentantoj de UEA, Cesco Reale kaj Stefano Keller alparolis la Forumon ĉe la tag-

ordero pri malfacilaĵoj spertitaj en la praktikado de la rajtoj difinitaj en la Deklaracio.

Laŭ la regularo de UN en kunsido eblas paroli, krom en iu el la ses oficialaj lingvoj de UN, ankaŭ en iu alia lingvo, kondiĉe ke tion akompanu interpretado en unu el la oficialaj lingvoj fare de la intervenantoj. Tia interveno okazis en la 2a Forumo en 2009, al kiu la ĉefreprezentanto de UEA Stefano Keller invitis reprezentanton de la Svisa Federacio de

Surduloj, kiu faris sian intervenon gestolingve, kun akompana voĉa interpretado en la francan.

Diskriminacio ĉe posten-oferto

La alparolo de UEA en la 5a Forumo okazis en Esperanto: Stefano Keller legis, kaj Cesco Reale interpretis hispanen, alineon post alineo. UEA atentigis pri la daŭra lingva diskriminacio ĉe laborpostenaj ofertoj, kiu hodiaŭ estas ankoraŭ malpli priatentata kaj malaprobata ol alispecaj diskriminacioj menciitaj en la Deklaracio pri la Rajtoj de Minoritatoj. Dum posta interparolado la sendependa fakulo de UN pri malplimulto, s-ino Rita Izsák, gratulis pro la interveno de UEA kaj pozitive esprimis sin pri Esperanto.

“Laŭ mia scio, tiu ĉi estis la unua Esperantlingva interveno de UEA ĉe UN,” supozas Stefano Keller, kiu estas ankaŭ la estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj.

Lingvorajtaj problemoj

Multaj intervenantoj de malplimulto menciis lingvorajtajn problemojn. Reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj substrekis la neceson traduki la Deklaracion en laŭeble plej multe da lingvoj kaj disvastigi ĝin tutmonde.

La evento donis okazon al la komisiitoj de UEA rekontakti konatojn el aliaj NROoj kaj ekhavi novajn kontaktojn. Okazis ankaŭ laborkunsido de la tuta kvinmembra teamo de UEA por pritrakti la ĝisnunan kaj plani la estontan agadon de UEA ĉe la Ĝeneva UN-sidejo.

Laŭ Gazetara Komunikado de UEA N-ro 483 (29 nov. 2012). Teksto kaj sonregistraĵo de la interveno de UEA: <http://www.lingvaj-rajtoj.org/eventoj>. □

RECENZO

REVIEW

Effects of earthquakes in Japan

Simboloj por restarigo de Jokohamo – instalaĵoj konstruitaj en la jaro 1930, DVD and booklet, compiled by Ĉiba Takaŝi, translated and read by Doi Ĉieko; and La Granda Tertremo en la Orienta Parto de Japanio kaj nia vivo poste, booklet compiled by Doi Ĉieko; published by Jokohama Esperanto-Rondo, September 2011, each booklet 12 pages. E-mail address for the project: doi-cik@seaple.icc.ne.jp.

This is a modest pair of booklets accompanying a DVD documenting the effects of earthquakes on life in Japan.

The DVD, relating to the earthquake of 1923 and the subsequent rebuilding, has a compilation of telling images – still and moving, black-and-white and colour, from the past and the present – which provide the backdrop to the spoken text. Occasionally there are superimposed titles or captions.

The text is reproduced verbatim in the booklet with the same

title, which helps to clarify matters when the spoken text is unclear – either because of the odd lapses by the speaker, or where, for Europeans at least, unfamiliar names are used. The introduction explains that the film material was compiled in 2010, in Japanese, as a jubilee tribute to the reconstruction and expansion of Yokohama, but the irony of history makes it now also – more urgently – a reminder to the world of what Japan experienced in March 2011 and beyond.

The second booklet describes this latter earthquake, the tsunamis, and the ensuing devastation, casting a glance in fifteen or so short sections at various aspects of public and private life. The description is not particularly scientific or technical, but it is relatively straightforward reporting, quite accessible to the general reader. Its emotional restraint is in stark contrast to what it describes.

Malcolm Jones

Accrington, Zamenhof and eBay

Unusual find sheds historical light

In October 2012, while browsing on eBay, I was surprised to come across an unrecorded message by Dr Zamenhof listed for sale. Addressed to a Mr Edwin Roberts, secretary of the Accrington Esperanto Society in Lancashire, the postcard is clearly written in Zamenhof's spidery script. It is undated, but the postmark makes it clear it was posted in August 1912. Wondering about the source of this card and other Esperanto books he listed, I contacted the vendor, who kindly replied:

"I acquired them a few weeks ago at a local shop that deals in house clearances and bric-a-brac. ... I bought quite a lot; they were not expensive. When looking through the books when I got home I realised that they had

belonged to the president of the Accrington Esperanto branch, Mr H.E. Roberts. There were little notes and a few postcards tucked in between the pages; this is where I found the L.L. Zamenhof postcard."

Considerable bid for postcard

Dr Zamenhof's postcard is not earth-shattering. He writes to thank the Esperantists in Accrington, turning down the invitation to him to become their Honorary President. He wrote many such cards turning down such titles. It would have been good to acquire this card for the Butler Library, but it

was finally sold for £310!

It is all too clear what had happened. Descendants of Mr H.E. (probably Edwin) Roberts had kept the books safely, until the next generation wanted to sell the house, and they called in a contractor to clear everything out.

The Esperanto Society in Accrington was founded in 1909. J.D. Applebaum in his "A short history of the Lancashire and Cheshire Espe-


ranto Federation 1908-1933" published in 1933, records that the founder was a dentist called Lee. A Miss Lizzie Iddon became a Fellow of the British Esperanto Association in January of that year. She was listed as secretary, and S. Kirkbright was listed as chairman in January 1911. By August of that year it was meeting daily. The invitation to Zamenhof dates from the time of this great expansion. Sadly, I have been unable to trace the minute books and other records of that society, and I wonder whether they have survived.

Importance of conservation

The sudden appearance of a previously unknown postcard from Zamenhof should serve to remind us of how important it is to conserve our records. The Butler Library in Barlaston is a superb collection of books and other resources, looked after by librarian Geoffrey King, and there are minute books and correspondence in and about Esperanto to be found in several records offices in different parts of the United Kingdom.

May I take this opportunity to ask all those who have archive material on Esperanto in their home to deposit it in an appropriate place?

Hilary Chapman



Renkontiĝo de JEB en Belfasto

www.jeb.org.uk

Junularo Esperantista Brita (JEB) decidis okazigi dum la semajnfino de la 29a de septembro sian unuan renkontiĝon en Norda Irlando post jardekoj. La celo de tiu renkontiĝo estis ne nur ebligi al esperantistoj ĝui semajnfinojn kune, sed ankaŭ kunhelpi krei junularan esperantistan movadon en Norda Irlando, kaj evidente kunigi ĝin kun la jam ekzistanta junulara movado de Anglio, Skotlando kaj Kimrio. La renkontiĝo estis sufiĉe sukcesa, ĉar en ĝi partoprenis 9 homoj el 5 nacioj, kaj estis rimarkinde, ke inter la partoprenantoj estis 4 nord-irlandanoj. Ankaŭ indas menci, ke unu partoprenanto venis el Francio nur por ĉeesti la renkontiĝon.

Helpi krei lokajn grupojn de JEB tra Britio kaj Norda Irlando
Kiel kutime, kelkaj partoprenantoj alvenis al Belfasto jam vendredon por havi iom pli da tempo en la urbo kaj ankaŭ iom pli da tempo inter esperantistoj. Nenio oficiala estis planita por tiu tago, do la ses homoj, kiuj ĉeestis tiun nokton, simple renkontiĝis en restoracio por

kune vespermanĝi. Ĉar la plimulto havis longan vojaĝon dum tiu tago, oni revenis sufiĉe frue al la junulargastejo por tuj ekdormi. Sabate matene, je la planita horo, homoj komencis alveni al drinkejo de la ĉeno Wetherspoon kiu nomiĝas The Bridge House, en la centro de Belfasto, por oficiale malfermi la renkontiĝon. Poste la komitatanoj bonvenigis ĉiujn kaj komence homoj simple manĝis, babilis kaj drinkis. Post kelka tempo okazis prelegeto de la prezidanto Carlos Castellani pri JEB, pri la renkontiĝo kaj pri la nuntempa celo de JEB, kiu estas plifortigi kaj helpi krei lokajn junularajn grupojn tra Britio.

Venonta renkontiĝo eventuale en Bristolto en februaro

Post tiu prelegeto, oni ekdebatis pri tio, kie kaj kiam okazigi la sekvan renkontiĝon de JEB. Kaj kvankam tio ankoraŭ ne estas findecidita, la favorata kaj plej verŝajna loko estos Bristolto meze de februaro 2013. Pli da informoj pri tio oni povas trovi en nia retpaĝo [/jeb.org.uk/](http://jeb.org.uk/).

Post la tagmanĝo, la lokano Brian Shannon gvidis ekskurson

tra la urbocentro, kiu daŭris plimalpli tri horojn. Dum ĝi oni vizitis multajn lokojn, kiel ekzemple la urbodomon, la preĝejon de Sankta Malachy, la Titanikan Muzeon (bedaŭrinde nur de ekstere) kaj estis ankaŭ longa promeno preter la marbordo. La vetero tiam ne estis plej varma, tamen tute ne estis pluvo dum tiu tago, kio helpis bone etosigi la agrablan ekskurson. Ĉirkaŭ la 18a horo vespere ĉiuj venis al drinkejo apud la maro por ripozi, drinki kaj babili. De tie kelkaj homoj jam komencis reveni al siaj gastejoj por ripozi por la sekva tago, kiam oni planis matene viziti la botanikan ĝardenon kaj poste la Muzeon de Ulster. Tiuj, kiuj ankoraŭ restis, poste venis al picejo en la centro por vespermanĝi. Kaj tie oficiale finiĝis la dua tago de la renkontiĝo.

Dimanĉon matene, ĉirkaŭ la 10a horo, homoj denove renkontiĝis en la sama drinkejo, kie oni antaŭe malfermis la renkontiĝon. Tamen oni ne restis tie, sed paŝadis direkte al la botanika ĝardeno. Post plimalpli unu horo inter la plantoj oni iris al la Muzeo de Ulster, kiu estis tuj apude. Estis interesa vizito, ĉar tie estis multaj vidindaĵoj kaj informoj pri historio kaj prahistorio de Norda Irlando, inter aliaj aferoj.

Ĉar estis jam dimanĉo posttagmeze, kelkaj homoj komencis siajn vojaĝojn hejmen. Tamen restis ankoraŭ kvin, kiuj venis al itala restoracio por tagmanĝi. Tiam oni denove ekdiskutis pri la estontaj renkontiĝoj de JEB, kaj la prezidanto finfine oficiale fermis la tre agrablan renkontiĝon en Belfasto.

Carlos Castellani

Courtesy of @ www.telegraph.co.uk



• Enriched, expanded library planned for new Lernu.net
The new library, which will be launched with the new Lernu.net in early 2013, will have a much wider collection of content than the current library. The contents will include many works of Esperanto literature, and also sounds and videos with accompanying text. The planned library will be especially useful to beginners, with its ability to translate words with a simple click, but its contents will be rich and varied enough to be interesting for Esperantists of all levels.

Part of the project is to include, with permission, texts from the literature archive of Don Harlow, a well-known US Esperantist who died several years ago. The new library will make his work available to a new generation of Esperantists, in an easy-to-use form. ESF is financially supporting the creation of the new library as part of its support for a complete renovation of Lernu. If you want to contribute to the project, the Lernu team (teamo@lernu.net) is looking for volunteers to help enter texts; a high level of Esperanto is not necessary. Financial gifts in support of ESF's work are also greatly appreciated (<http://kampanjo.ikso.net/en/>). *Libera Folio* recently published an article (in Esperanto) on the new Lernu library (for which see <http://www.liberafolio.org/2012/nova-reta-biblioteko-aperos-ce-lernu>).

• **Nova retpaĝaro "vizitinda"**
Venis laŭdoj pri la nova retpaĝaro Novaĵoj. Laŭdire "Indas viziti ĝin ĉiutage". Bonvolu mem juĝi ĉe <http://novajhoj.weebly.com/index.html>.

• **Kongresa Temo en Rejkjaviko**
La Kongresa Temo por la venonta Universala Kongreso en Islando estos "Insuloj sen izoligo: por justa komunikado inter lingvokomunumoj". □

Esperanto at Coventry Language Café



On Sunday, 23 September Coventry Language Café arranged a multi-lingual café at the Central Library as part of the European Day of Languages. There were about ten languages represented, both European and languages of the Far East, as well as Esperanto. Tim Owen and Clare Hunter manned the Esperanto table, while John Gobourne visited the other tables to do a little promotion. About 40 people visited the café during the afternoon but it was noticeable that the majority of conversations were in English, except at the Esperanto table where Tim, Clair and John joked and chatted as though Esperanto was their mother tongue.

John Gobourne

Venontaj kunvenoj

SLEG renkontiĝos 19 jan. 13h00 en Hotelo Hilton, Liverpolo (poste en La Internacia Muzeo pri Sklaveco, Albert Dock). 2 feb. kaj 2 marto en The Crown, Birkdale, kie SLEG kutime kunvenas ĉiumonate la unuan sabaton. Pliaj novaĵoj estas en la retpaĝo de SLEG.

La Liverpola Rondo kunvenas ĉiumonate la trian sabaton.

Some Esperanto magazines 2013

Please send subscriptions for 2013 to Esperanto House. Cheques should be payable to 'Esperanto-Asocio de Britio', alternatively you can find magazine subscriptions available for purchase at our on-line bookshop.

- ✳ *La Gazeto*. Cultural. Six yearly. £25.50
- ✳ *Juna Amiko*. For young Esperantists. Quarterly. £14
- ✳ *La Kancerkliniko*. 'Alternative' view of Esperantoland. Quarterly. £23
- ✳ *Litova Stelo*. General. Six yearly. £13
- ✳ *Monato*. High quality, current affairs. Monthly. £44 (by air £48; by e-mail £26.40)
- ✳ *La Ondo de Esperanto*. General, social-cultural. Monthly. £35 (by air £39.50; by e-mail £11)
- ✳ *Scienca Revuo*. Quarterly. £19 (incl. membership of ISAE)
- ✳ *Laŭte*. Libertarian, plenty of reading. Six yearly. £14
- ✳ *La Jaro*. £5 (£7 by air)

Esperanto- aranĝoj

☆ Plena listo de aranĝoj estas konsultebla ĉe la retpaĝaro www.eventoj.hu. Se vi deziras rigardi mapon de aranĝoj, iru al: www.esperantoland.org

12–19 januaro

Montara Karnavalo en Zagórze Śląskie (60km for de Vroclavo), Pollando. Inf.: Bjalistoka Esperanto-Societo, Elbieta Karczewska, rete: esperanto.bialystok@interia.pl; tel: +48 791 856 034

18–21 januaro

8a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Meditado, Iksan, Korea Respubliko. Inf.: Esperantista Asocio de Onbulismo, rete: esperanto@saluton.net

18–22 januaro

48a Brazila Esperanto-Kongreso, Barra do Garças, MT, Brazilo. Ĉeftemo "Esperanto, Kulturo kaj Turismo: Alternativoj por verda ekonomio". Inf.: Brazila Esperanto-Ligo, Rua Manoel Oleiro, 93/A, Jardim Piracema, Barra do Garças, MT, CEP 78600-000. Tel. +55(66) 3401-7782 / 9899 / 5203; poŝtel.

+55(66)9979-6005; rete: cyrusgofre@gmail.com

25–27 januaro

Internacia Festivalo de Maskaradaj Ludoj – 'SURVA', Pernik (30km de Sofio), Bulgario. Inf.: UPIEK, Bulv. Slivnitsa 204, BG-1201 Sofia; rete: lasto@mail.bg

22–24 februaro

Course-You-Can, Drono kaj Ni Muzikumu!, Shallowford House, Staffordshire. Kurso por komencantoj kaj komencintoj, kaj Esperantlingva diskutrondo por progresintoj. Inf.: EAB, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; rete: eab@esperanto.org.uk; tel. 0845 230 1887

24 februaro

Ekspozicio pri Esperanto, Nankana Sahib, Pakistano. La 2a Ekspozicio pri Esperanto 'Lingvo kaj Kulturo' inkluzive de renkontiĝo de Pakistana ILEI-sekcio kaj Junulara Esperantista Pakistana. Inf.: ILEI-pk kaj JEP, Ward No. 11, Near M.C. High School, Nankana Sahib; rete: ilei.pk@gmail.com

26 februaro–11 marto

10a Internacia Himalaja Renkontiĝo, Katmanduo, Nepalo. Inf.: Nepala Esperanto-Asocio, GPO Box 10518, Kathmandu. Tel. +977-1-6209877; rete: nespa.1990@gmail.com aŭ luno1962@gmail.com

1–9 marto

20a Esperanto-Ĥora Semajno en Pireneoj, La Bastide-sur-l'Hers, Francio. "Kvin horoj da taga kvarvoĉa kantlaboro, turismo, kulturo, koncerto, bona manĝo ktp." Inf.: Jorgos Esperanto-Mirevia, FR-11 420 Lafage; rete: tutpeko@aliceadsl.fr

9–16 marto

Meditanea Esperanto-Semajno, Lazura Marbordo, St.-Raphael, Residence Val d'Esquière, Les Issambres, Francio. "Vin atendas amika, familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro." Inf.: Monique Prezioso, 92 allée des Harkis, FR-83700 Saint-Raphael; rete: prezmoni@hotmail.com; tel. +33(0)4 94 83 06 88

13–17 marto

Kuba Esperanto-Renkontiĝo (KERo), Santa Cruz del Norte, Kubo. Klerigaj, fakaj, artaj, distraj kaj sportaj aranĝoj, aktivulaj seminarioj, diskoteko kaj ĉiutaga radioelsendo. Inf.: Kuba Esperanto-Asocio, Apartado 5120, CU-10500 La Habana; rete: info@esperanto.co.cu

13–17 marto

Bibliaj Tagoj kun Adoru, Strasburgo, Francio. Internacia renkontiĝo ekumena. Inf.: Stefan Lepping, Mellinstr. 5, DE-59457 Werl, Germanio; rete: stefanlepping@gmx.de

15–17 marto

Iberia Renkontiĝo 2013, Madrido, Hispanio. Inf.: Hispana Esperanto-Junulara Societo, rete: IROMadrido2013@gmail.com

20–22 marto

Seminars in Esperanto linguistics, literature and language in the University of Liverpool. Suitable also for learners (see more info. on p. 4). Inf.: EAB, tel. 0845 230 1887; rete: eab@esperanto.org.uk

25 marto–1 aprilo

29a Printempa Semajno Internacia, St. Andreasberg (Harz), Germanio. Programo kun prelegoj, ekskursoj kaj diversaj kursoj, kaj vizito de la paska leporo. Infanoj kaj gejunuloj havas sian propran programon. Inf.: www.esperanto.de/psi; rete: psi@esperanto.de

Obituary – Nekrologo

Donald Lord died on 30 September 2012 after a long illness. Don studied Esperanto in an evening course at the age of 15. He was taught by one of the teachers of the famous Eccles Experiment. During the war and in the 1950s he had little contact with the organised Esperanto movement until a chance meeting with a member of the Manchester Esperanto Society in the early 1960s. Don joined the Manchester club, which then had a large and active membership, and soon became one of its most enthusiastic and productive members and officers. Within a short time Don became involved also in the national movement and over the years held various offices in the British Esperanto Association, including membership committee president and vice-president. His lectures and seminars were always extremely popular, and his erudition was evident even when seemingly masked under cover of the most hilarious presentation. He will be missed by his many friends in the national and international movement. A full obituary will appear in *La Brita Esperantisto*, Spring 2013.

Graham Blakey



Vojaĝu al Esperanta aranĝo kaj trovu novan amikon

5–8 aprilo

1a Indonezia Esperanto-Kongreso, Wisma Abdi, Bogor, Indonezio. Ĝi temos ĉefe pri lernado, ekzamenado kaj kreo de nacia asocio. La indoneziaj esperantistoj esperas bonvenigi multajn eksterlandanojn. Inf.: <https://sites.google.com/site/esperantoindonezio/kongreso/> aŭ [.../site/iek2013bogor/](https://sites.google.com/site/iek2013bogor/); rete: redakcio-ideo@googlegroups.com

27 aprilo

38a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. Ĉiuj bonvenaj; gast-preleganto anoncota. Inf.: www.uea.org; rete: uea@co.uea.org

18–22 aprilo

7a Azia Kongreso de Esperanto, Jerusalemo, Israelo. Inf.: eli@esperanto.org.il

29 aprilo–9 majo

25a Aroma Jalto, Jalto, Ukrainio. Esperanto-festivalo, kies celo estas plialtigi la lingvonivelon de partoprenantoj kaj konigi al ili la naturon de Krimeo. Inf.: Volodimir Hordijenko, p/k 35, UA-01133 Kiev; rete: volodomir@ukr.net

3–5 majo

72a Hispana Esperanto-Kongreso, Zaragoza, Hispanio. Temo: 'Lingvo kaj sento'. Inf.: Asocio 'Frateco', Cadena, 20, 1^o-izquierda, ES-50009-Zaragoza; rete: kongreso@esperanto.es

4–11 majo

65a Kongreso de IFEF kaj de UFE, Artigues (apud Bordojo), Francio. Temo: 'Rolo de la fervojoj en disvolvigo de la moderna mondo'. Inf.: AFCE, 9 rue de Château-

Landon, FR-75475 Paris (10); rete: jeanripoche@wanadoo.fr

8–12 majo

Printempa BARO 2013, Bad Mündler (inter Hanovro kaj Hameln), Germanio. Promeni, komune kuiri kaj ludi. Inf.: www.krokodilo.de/baro/baro.php; tel. 01577 4273240; rete: andim@gmx.li

10–12 majo

94a Brita Kongreso de Esperanto, Ramsgate, Kent, Britio. Inf.: EAB, Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; rete: eab@esperanto.org.uk; tel. 0845 230 1887

17–20 majo

90a Germana Esperanto-Kongreso, Nurenbergo, Germanio. Inf.: Sabine Hauge, Esperanto-Nürnberg, Moritzbergstr. 37, DE-90482 Nürnberg; rete: esperantonord@googlemail.com

18–20 majo

10a Mez-kanada Renkontiĝo de Esperanto, Otavo, Ontario, Kanado. Turisma amikeca semajnfino. Inf.: Esperanto-Societo Kebekia, lige kun Otava Esperanto-Rondo; rete: info@esperanto.qc.ca

25–26 majo

61a Kongreso de Esperantistoj okazos en Civitana Domo, urbo Wakayama, Kansajo, Japanio. Inf.: oficejo@epa.jp

7–10 junio

108a Skota Kongreso de Esperanto, Linlithgow. Inf.: David Hannah, Tigh na Cnoc, Ardgay Hill, Ardgay, Sutherland IV24 3DH. Tel. 01863 766061; dhannah559@hotmail.com

28 junio–8 julio

Roskilde-Festivalo 2013, Roskilde, Danlando. Senpaga esperantista renkontiĝo dum la plej granda muzikfestivalo de Norda Eŭropo; antaŭ- kaj postfestoj en Kopenhago. Inf.: <http://kef10.saluton.dk/>; <http://roskilde.festoklubo.dk/>; <http://dejo.dk/>

9–16 julio

Kultura Esperanto-Festivalo, Hillerød, norde de Kopenhago, Danio. Inf.: kulturaesperantofestivalo10@gmail.com

12–18 julio

Konferenco de ILEI. Temo: 'Instruado de Esperanto al ĉiuj aĝgrupoj', Herzberg, Germanio. Inf.: tel. 05521 5983; rete: esperanto-urbo.de; esperanto-zentrum@web.de

12–20 julio

Somera Esperanto-Studado. La sesa renkontiĝo de lernantoj de Lernu.net, (sed ne nur de ili), Martin, Slovakio. Lernado, ekskursoj, prelegoj, man-laboroj, amuzado. Inf.: www.lernu.net; rete: petro@ikso.net

20–26 julio

Internacia Esperanto-Konferenco, St.-Amand-Montrond, Francio. Inf.: osiek.org/iek/IEK-2013-alighilo.pdf

20–26 julio

3a Internacia Esperanto-Semajno, Erevano, Armenio. Ekskursoj antaŭe kaj poste. Inf.: <http://www.area.am>; rete: ies-3.armenia@area.am

New Members of EAB

Alberto Campagnolo, London
Andy Hofstedt, Dembley
Jean Jamieson, Falkirk
Brian Shannon, Belfast

Deceased members

Donald S. Lord, Middlewich
Ellen Rooney, Brigg

CONGRATULATIONS:

Completed the Free Postal Course

Gilbert Sikala, Kenya

Exam success

Brendan Marsh, Prenton.

Intermediate Exam: Distinction

20–27 julio

98a Universala Kongreso de Esperanto, Rejkjaviko, Islando. Inf.: UEA (vidu la kolofonon); http://uea.org/kongresoj/uk_2013.html

3–10 aŭgusto

Adriatika feriado, Prvić Luka (insulo Prvić, en la insularo de urbo Šibenik, Kroatio. Feria kaj turisma aranĝo kun Esperantaj programoj kaj vizitoj al naciaj parkoj. Inf.: Dokumenta Esperanto-Centro, p.p. 79, HR-48350 Đurđevac; rete: dec.kroatio@gmail.com

3–10 aŭgusto

80a Itala Esperanto-Kongreso, Castellaro (apud San Remo), Italio. Inf.: Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi 38, IT-20143 Milano; www.esperanto.it. Tel. 02 58 100 857; rete: fei@esperanto.it

3–11 aŭgusto

Amika rondo, N. Tagil, Rusio. Renkontiĝo dediĉita al la festo-tagoj de la urbo. Inf.: Larisa Kuzmenko, N. Tagil, ul. Kushvinskaja 25A, RU-622013; rete: klarisa8@yandex.ru

6–16 aŭgusto

Esperanto-turisma marŝo 'Milan Zvara', Karpata montaro, Ukrainio. Esperantista piedmarŝo al la plej alta monto de Ukrainio, Hoverla. Inf.: V. Hordijenko, p/k 35, Kiev-133, UA-01133; rete: volodomir@ukr.net

12–16 aŭgusto

Somera Festivalo, Shallowford House, Staffordshire (vidu paĝojn 4–5). Inf.: EAB, Barlaston, tel. 0845 230 1887; rete: eab@esperanto.org.uk

19–26 aŭgusto

69a Internacia Junulara Kongreso, kibuco Afikim (proksime al la lago Galileo), Israelo. Inf.: eli @esperanto.org.il

20–22 septembro

29a ARKONES – ARTaj KONfrontoj, ESperanto, Poznań, Pollando. Sendependa kultura kaj arta esperantista aranĝo – unu el la plej grandskalaj manifestadoj de Esperanto-kulturo. Inf.: Tobiasz Kamierski, rete: tobiasz@esenco.org

4–6 oktobro

27a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj, Mora, Portugalio. Landa ĉiujara renkontiĝo: klerigadista programo, loka turismo; informado; movada diskutado. Inf.: Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. João Couto, 6 r/c-A; PT-1500-239 Lisboa; rete: rpe@esperanto.pt

6–11 oktobro


3a Esperantista Migrado Aŭtuna, Zell/Mozelo, Germanio. Migrotagoj kun vidindaĵoj en mezmontara vinregiono de Mozelo (nur 30 lokoj!). Inf.: Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler; rete: wolfgang.bohr@esperanto.de

12–15 oktobro

100a Japana Esperanto-Kongreso, Saporo, Japanio. Inf.: JEI, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, JP-162-0042 Tōkyō-tō; rete: jek100@jei.or.jp

julio 2014

99a Universala Kongreso de Esperanto, Bonaero, Argentino. Inf.: UEA (vidu la kolofonon).



Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko

‘PoMEGo’ – kiel oni jam karese kromnomas ĝin! – celas ordinarajn esperantistojn, kiuj volas studi la gramatikon, vortfaradon, skribon kaj elparolon de la Internacia Lingvo. Ĝi estas unuavice **praktika konsultlibro kaj lernilo**, ne teoria verko por lingvistoj.

Plena manlibro de Esperanta gramatiko klarigas la lingvon en **facila maniero** – kaj la plej bazajn aferojn, kaj tre specialajn detalojn. Ĝi uzas por helpi al la klarigoj **abundon da ekzemploj**, inter kiuj estas multege da ekzemploj el la Fundamento kaj la verkaro de Zamenhof.

La libro estas bele presita, profesie enpaĝigita kaj fortike bindita. La kompilinto, Bertilo Wennergren, estas la Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro de Akademio de Esperanto.

Bertilo Wennergren: *Plena manlibro de Esperanta gramatiko*. El Cerrito (CA): Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, 2005. 696 paĝoj, 15 x 23 cm., bindita, kun papera kromkovrilo. ISBN 0-939785-07-2.

• **Vendoprezco ĉe EAB:** po £23 plus sendokostoj de 20% = £27,60